

23

The American ESPERANTO JOURNAL



COPYRIGHT, 1907, BY THE AMERICAN ESPERANTO COMPANY

VOL. II

JANUARY, 1908

No. 1 (13)

Affiliated Organizations of the American Esperanto Association

Los Angeles Esperanto Society.....Ralph Bond, 232 S. Hill St., Los Angeles, Cal.
 San Diego Esperanto Society.....C. A. Babcock, Jr., R. F. D. 1, San Diego, Cal.
 New Britain Esperanto Society.....Rolland B. Moore, P. O. Box 700, New Britain, Conn.
 Washington Esperanto Society..Chas. W. Stewart, 1211 Kenyon St., N. W., Washington, D. C.
 Emory Esperanto Club.....Jack Dempsey, Emory College Oxford, Ill.
 Illinois Esperanto Association.....Edwin C. Reed, Ashton Block, Rockford, Ill.
 Chicago Esperanto Society.....Carleton W. Washburne, 553 Jackson Blvd., Chicago Ill.
 Leibniz Esperanto Club.....Adolph Kroch, 126 Randolph St., Chicago, Ill.
 Univ. of Chicago Esperanto Society.....Miss M. E. Smith, 6043 Ellis Ave., Chicago, Ill.
 Elgin Esperanto Society.....Dr. Clara L. Todson, 23, The Spurling, Elgin, Ill.
 La Juna Stelaro.....D. A. Johnston, Y. M. C. A., Rockford, Ill.
 Rockford Esperanto Society.....Derwent Whittlesey, 1815 Elm St., Rockford, Ill.
 Esperanto Club of Rockford.....Chas. Froeding, 1216 20th Ave., Rockford, Ill.
 Indiana Esperanto Association..Mrs. Winifred S. Stoner, U. S. Marine Hospital, Evansville, Ind.
 Juna Espero Esperanto Society....Miss Julia Bierbower, 610 Upper 1st St., Evansville, Ind.
 Non Nobis Solum Esperanto Club...Miss Sadie Rucker, 1025 Chandler Ave., Evansville, Ind.
 Indianapolis Esperanto Society.....Miss Mary McEvoy, 21 E. Ohio St., Indianapolis, Ind.
 Kansas State Agri. College Esperanto Club.....Andrew J. Wheeler, Manhattan, Kan.
 Portland Esperanto Society.....Herbert Harris, "The Somerset," Portland, Me.
 L'Espero Esperanto Club.....Mrs. A. D. Bird, 40 Camden St., Rockland, Me.
 Massachusetts Agri. College Esperanto Club..E. Victor Bennett, 25 N. College St., Amherst, Mass.
 Boston Esperanto Society.....Edward K. Harvey, Perkins Institution, S. Boston, Mass.
 Esperantaj Pioniroj.....Aron D. Wolpe, Perkins Institution, S. Boston, Mass.
 Cantabrigia Esperanto Group...Mrs. Estelle M. H. Merrill, 45 Bellevue Ave., Cambridge, Mass.
 Harvard Esperanto Society.....H. R. Shipherd, 669 Dana St., Cambridge, Mass.
 Marsh Esperanto Club.....F. W. Woolway, 77 Union St., Newton Centre, Mass.
 Worcester Esperanto Society.....Herbert K. Cummings, Polytechnic Institute, Worcester, Mass.
 Winona Esperanto Club.....Rev. J. I. Cleland, 278 W. Fourth St., Winona, Minn.
 St. Louis Esperanto Club.....Mrs. Meade C. Dobson, 4604 McMillan Ave., St. Louis, Mo.
 Good Templars Esperanto Club.....Harry C. Welsh, c.o. M. M. Co., Missoula, Mont.
 First Nebraska Esperanto Club.....Mrs. E. A. Russell, Ord, Neb.
 Searchlight Esperanto Society.....Dr. E. W. Newell, Searchlight, Neb.
 Auburn Esperanto Society.....Clarence F. Welch, Recorder's Office, Auburn, N. Y.
 Brooklyn Esperanto Society.....Durbin Van Vleck, 154 Hancock St., Brooklyn, N. Y.
 New York Esperanto Society.....Stephen W. Travis, Jr., Tenafly, N. J.
 Columbus Esperanto Society.....M. Janet Rogers, 403 Luchhaupt Ave., Columbus, Ohio.
 Esperanto Club of Ohio State Univ.....Charles W. Park, Ohio State Univ., Columbus, Ohio.
 Toledo Esperanto Club.....H. S. Blaine, P. O. Box 999, Toledo, Ohio
 Philadelphia Esperanto Society.....Lewis B. Lueders, 206 6S. 41st St., Philadelphia, Pa.
 Jamestown Esperanto Club.....Leo V. Judson, 101 Wood St., Norfolk, Va.
 Seattle Esperanto Society.....Wm. G. Adams, 309 27th Ave., Seattle, Wash.

"MI AŬDAS VIN"

*La unua kanto Esperanta eldonita
 en la U. S.; muziko de Sro. Herbert
 Harris; poemo de Dro. Leono
 Zamenhof. Facila por meza voĉo.*

PREZO: FR. 1.74 (35 CENTS); 5 EKZEMPLEROJ, FR. 7.50 (\$1.50)

AMERICAN ESPERANTO ASSOCIATION

Boulevard Station,

Boston, Mass.



THE AMERICAN ESPERANTO JOURNAL



PUBLISHED BY THE AMERICAN ESPERANTO COMPANY
211 WEST 126th STREET. NEW YORK CITY, U. S. A.

CABLE ADDRESS: ESPERANTO NEW YORK.

VOL. II. No. 1. (13).

JANUARY, 1908.

PRICE, 10 CENTS.

SUBSCRIPTION PRICE

One Year \$1.00
Six Months50

Subscriptions can commence
with any number.

The Editor reserves the right to correct all manuscripts
Unavailable contributions he will return IF the writer sends
postage stamps or international coupons, but not otherwise.
If contributions are not typewritten, they must be very
carefully written by hand.
Articles on distinctively American subjects will be especi-
ally appreciated by the Editor.

ADVERTISEMENTS

For advertising
rates, see fourth
page of cover.

“NI KREDAS JE LA NETUŝBLECO DE LA ESPERANTA FUNDAMENTO ZAMENHOFA”

Deklaracio de la Esperantistaj Gazetoj

LA subskribintoj, redaktoroj de esperantistaj gazetoj, promesas:

1. Klopodi por atingi en siaj gazetoj kiel eble plej grandan korektecon de la lingvo kaj *obeadi la regulojn kaj Fundamenton* de la Zamenhofa lingvo Esperanto;
2. Eviti ĉiujn farojn aŭ diskutojn, kiuj celadus *iel ajn ŝanĝi* la Zamenhofan lingvon;
3. Rekomendi nur eldonaĵojn, verkojn, gazetojn, kiuj same obeas la regulojn kaj Fundamenton de la Zamenhofa lingvo, kaj se ili raportos pri aliaj, almenaŭ montri iliajn neakcepteblajn flankojn.

Al tiu ĉi Deklaracio ĝis nun aliĝis la sekvantaj el la nun ekzistantaj gazetoj esperantistaj:

THE AMERICAN ESPERANTO JOURNAL

Amerika Esperantisto	Espero Pacifista	Lingvo Internacia
Brazila Esperantisto	Germana Esperantisto	Pola Esperantisto
Bulgara Esperantisto	Internacia Scienca Revuo	Socia Revuo
Časopis Českých Esperantistů	Juna Esperantisto	Suno Hispana
Esperanta Ligilo	Laboro	Svisa Espero
Esperanto Ĵurnalo	La Revuo	The British Esperantist
Espero Katolika	L'Espérantiste	Tra la Mondo

Eminentaj Usonanoj: Theodore Roosevelt*

THEODORE ROOSEVELT, la 26a kaj la 27a Prezidanto de Usono, estas la plej juna homo kiu iam sidis sur la regnestra seĝo en Washington. Li naskiĝis, en New York City, la 27an de Oktobro, 1858, kaj tial estas nun malpli ol kvindekjara.

Lia kariero estas daŭra montrado pri l'utilo de decidemo. Knabo, li estis malforta kaj malsanema. Li sentis ke, se li iam povos fari grandagojn, li devos esti forta, kaj tuj li praktikadis korppezcojn ĝis li fortiĝis. Nun li estas viro muskola, sperta rajdisto, ĝusta pafisto, kaj absolute sen timo.

S-ro Roosevelt, dekokjara, eniris Harvard-an Universitaton, kie li atingis, kvar jarojn poste, sian gradon, kaj tiam komencis studi la leĝosciencen en New York. La sekvan-tan jaron lia distrikto elektis lin ŝtatlegisla-turano, kaj lin trovis tiel kontentiga ke ĝi lin elektis dufoje plu. Li estis delegato al repukli-kanaj kunveno, ŝtata kaj tutlanda, kaj tiam li decidis forlasi kelkatempe la politikon por vivi la vivon naturan.

Li aĉetis ranĉon en la malproksima okcidento: North Dakota. En tiu ĉi parto de nia lando aferoj estas iom malsimilaj ol en la ordinara vivo de l'oriento. Grandegaj ebenaĵoj kaj montegaroj donas al la vivo vidpunkton pligrandan, kaj kvankam ni estas ĉiuj usonanoj, la ordinaraĵojn ĝentil-aĵetojn de l'oriento oni malestimas tie. Roosevelt ŝajnis unue al la okcidentuloj kiel ili nomis lin: "Mol-piedulo"; kaj oni riĝegis je lia tro-lavemo, lia kultu-

rita elparolo kaj liaj nazpinĉaj okul-vitroj. Foje, iu en trinkejo insistis ke Roosevelt invitu ĉiujn ĉeestantojn trinki, kaj eliris revolveron por timigi la novulon. Roosevelt stariĝis, kvazaŭ li kunsentis, sed post eta momento la insistinto sin trovis sur la planko, dum Roosevelt, kiu estis liverinta al li pugnobaton ellernitan ĉe Harvard, kviete residiĝis. De tiam, la respekto universala ĉiam estis lia.

Li restis en North Dakota du jarojn, kaj estus preferinta resti pli longe, sed lia politik-partio en lia foresto kandidatigis lin kiel urbestro. La grandaj partioj en Usono estas republikana kaj demokrata; Theodore Roosevelt estas kaj ĉiam estis republikanano kaj New York estas kaj ĉiam estis demokratema. La kutima afero okazis: demokratanon oni elektis urbestro. Ĉu Roosevelt malĝojis?

Neniel. Li edziĝis kaj ekvojaĝis Eŭropon por ĝui libertempon.

Dum li estis en fremdaj landoj li verkis multe kaj senĉese. Jam li verkis rakontegon pri la marbatalado de 1812 inter Anglujo kaj Usono kaj rakonton pri sia vivado kiel ranĉestro, du librojn, kiuj ankoraŭ estas tre popularaj. Sed li ne ŝatis la neokupatan vivon malproksiman de hejmo. Li revenis, decidinte preni kion ajn la sorto donos al li, kaj tuj li recevis de Prezidanto Harrison la oficon de "Civil Service" komisiano. Tiu ĉi komisio fondiĝis por certigi per ekzameno al la oficistoj sub regno iliajn oficojn—por ke politikistoj ne senigu ilin per poli-



* The illustrations to this article are reproduced by courtesy of *New York American* and *Evening Journal*. The cartoon on page 5 is by John H. Henrici.

tika influo. Roosevelt akceptis la taskon kun sia kutima energio, kaj kreis al si multe da malamikoj, kompreneble. En Washington la "influo" estas tre potenca, kaj la influemuloj troviĝas inter la plej gravaj anoj de la regno. Sed la nova komisiano batalis kaj bataladis, kaj baldaŭ faris el sia komisio respekstindan aferon. Ĝiajn utilajn efikojn oni ŝatas hodiaŭ. Prezidanto Cleveland, demokratano, ankaŭ lin restigis en la sama ofico.

Dume, la neatendita afero okazis en New York. Republikanan urbestron oni elektis. Tiu ĉi petis ke S-ro Roosevelt akceptu la oficon de poliestraranon (tiam, estis kvar poliestroj en New York) kaj Roosevelt kunsentis. Li revenis New York'on kaj trovis ke inter la policanoj, precipe la plej altaj oficistoj, estas multege da malhoneste. La ordinara New York'a policano estas admirinda viro, sed multaj el la kapitanoj kaj la inspektoroj estis kutimiĝintaj ricevi subaĉetojn por permesi al la leĝrompistoj daŭrigi siajn krimojn. Roosevelt unua militis kontraŭ tiu ĉi stato de aferoj, kaj kvankam li ne sukcesis tuj, li baldaŭ efektiviĝis sian intencion, kaj la policanaro sciigis ke ĝi havas realan estron. Multajn reformojn li atingis, kaj kiam lia tempo de ofico finiĝis, eĉ liaj malamikoj bedaŭris pri lia foriro. Ili rekonis fortan homon, kaj lin admiris kontraŭvole. Dum tiu ĉi tempo estis ankaŭ lia kutimo tramarŝi la urbon nokte, kun ia amiko, kaj eltrovi si mem korektindaĵojn; pro tio ĉi oni lin nomis "Haroun-al-Roosevelt."

Tiam alvenis la realvoko Washington'on. La prezidanto estis William McKinley, kaj tiu ĉi oferis al Roosevelt la oficon de subsekretario de la militŝiparo. Li kunsentis, ĉar li antaŭvidis la militon kontraŭ Hispanujo, kaj li



neniam ĉesis perfektigi niajn militŝipojn kaj maristojn. La rezulton ĉiuj scias. Sed rimarku la precipaĵon. Diris Roosevelt: "Dum la soldatoj kaj la ŝipanoj militas, mi ne povas resti hejme; mi helpis kaŭzi la militon, kaj mi mem do devas militi." Pro tiu ĉi rizolvo li sin nomigis leŭtenanto-kolonelo, kaj kun sia regimento de "Rough Riders" li iris Cuba'on. Ĉe San Juan-Monteto lia braveco estis senlima, kaj kiam li revenis New York'on li kompreneble estis populara idolo.

La paŝo el soldato ĝis guberniestro estis facila. Kiel reganto de New York'a Ŝtato li denove kontraŭis la politikaĉistojn. Liaj reformoj pereigis la sentaŭgulojn, kaj ĉe Albany, la ĉefurbo de la Ŝtato, la sentaŭguloj ne estas malmultaj. Tiuj ĉi malamegis lin tiel forte ke ili preskaŭ frenezigis. Do kiam fariĝis movo lin elekti vicprezidanto de Usono, estis ĝenerala ĝojo en Albany, ĉar nun, ili pensis, li falos en mallumon.

Kial ili tiel pensis? Fremdulo sciu ke, kvankam en tiu ĉi lando la vicprezidanto estas supoze la dua je graveco, realece oni aŭdas pri tiu oficisto tiom malmulte ke lia nomo estas kelkfoje forgesata. Li prezidas en la senato, kaj estas ĉio. Okaze de l' subita morto de



l' prezidanto, li tuj eniras en la lumon, ĉar li sukcesas al la prezido, sed tio ĉi malofte okazas, feliĉe. Roosevelt maldeziris akcepti la honoron de l' vicprezido, sed la estroj de lia partio tiom insistis al li, ke li cedis. Roosevelt ĉiam estis forta partiano, kaj li tute kredas en politikaj partioj. Sed denove Fatalo estis post li.

Homo senracia mortigis William McKinley kelkajn monatojn post la komenco de lia dua administrado. Theodore Roosevelt estis malproksime en la Adirondack'aj Montoj kiam oni alportis al li la anoncon de liaj novaj devoj. Li tuj reiris Washington'on, kaj fariĝis Prezidanto de Usono.

Kaj kiam lia trijara administrado estis plenumita, la lando akklamis Roosevelt'on bonega oficisto kaj lin *elektis* senpere al la rega sidejo. Li sciigis tiam ke li neniam petos esti prezidanto ree; kaj antaŭ ne longe li tion resciigis. Ke li povus esti elektata la duan fojon por esti prezidanto la trian fojon estas malmulta dubo, malgraŭ tio, ke la ĝenerala sento en Usono estas kontraŭ pli ol du administradoj de la sama homo; sed sian unuan administradon, kiu estis preskaŭ trijara, li taksis kiel tutan.

Kion mi diros pri la persono mem de Theodore Roosevelt? Mi lin renkontis unuafoje kiam li estis policestro, kaj tiam mi sentis lian nepriskribeblian energion eĉ en lia parolo pri malgrava afero. Mia demando estis ke li pozu ĉe l' skribtablo por fotografaĵo. Li ridetis sian larĝan rideton, montrantan la famajn brilegajn dentojn, kaj jesis afable. Estas preskaŭ tiel facile lin vidi nun kiel tiam, se la vizitonto estas bonfama ĵurnalisto.

La familio Roosevelt'a neniam estis malriĉa, kvankam ĝi ne estas riĉa; simple neriĉa. Ne necesis ke la filoj prilaboru, sed ili konsideris honte ne prilabori. Theodore Roosevelt estas klera pri ĉiuj fundamentaĵoj; sendube li estas la plej klera regnestro pri aferoj literatura, arta, politika kaj praktika, kiun la mondo iam konis. Li parolas ĉiam aŭtoritate, ĉar li *scias* antaŭ ol li parolas.

Lian kuraĝon neniu neos, malplejmulte liaj malamikoj! Ĝi estas morala same kiel korpa. Lia decido, kiam guberniestro, ke S-ino Place, la mortigintino, mortu elektrokute, kvankam estis ĝenerala krio kontraŭ ĝi, estis specimeno de lia morala kuraĝo. "Ŝi estas virino, jes," li diris, "sed ŝi mortigis virinon!" Pri lia korpa sentimo: foje, en la Blanka Domo, nokte li aŭdis bruon ĉe la herbejoj apudé, kaj kur-

ante al pordo vidis frenezulon kun revolvero baraktantan kun policano por mortigi la prezidanton. Roosevelt elkuris por helpi la policanon. "Tiu ĉi estis protektanta min," li klarigis, "kial mi ne helpus al li?"

Li havas la organizan potencon; kiam li eniras, konfuzo kaj nekapableco forkuras kaj donas lokon al ordo kaj kapableco. Li komprenas homojn; malgraŭ lia iom malmola maniero kiam li estas kolera, tamen li scias kiam estas la ĝusta momento kompromizi, ĉar, citi liajn vortojn, "se vi elektas la montpinton solecan, la aliaj ĉiuj vin forlasos, kaj via utilado estos detruata."

Lia nezorgo pri la opinioj de aliaj ofte montriĝas amuze. William J. Bryan estos, eble, la demokrata kandidato por prezidanto



tiun ĉi jaron. Kiam S-ro Bryan estis en Washington antaŭ ne longe S-ro Roosevelt ne nur lin ricevis bonkore, kiel estis dece, sed li havis longan konversacion kun li, pri kiu nek unu nek la alia sciigos ion. La partiemaj republikananoj iom koléris je tio! Ankaŭ, ĉar il forigis de sur la novaj ormoneroj la vortojn: "Je Dio Ni Fidas," koleris multaj, precipe la pastroj; Roosevelt diris ke la vortoj sur monero estas malpiaĵo kaj sentaŭgaj. Kaj, lia maniero aranĝi malpacon inter la du North Dakota'aj senatanoj per ĵeto de monero aeron por decidi kiuj el iliaj sekvantoj ricevos la plej bonajn oficojn federalajn sentofendis la seriozemulojn. Lia aprobo de la "simpligita silabado"; lia kontraŭemo al la fervojestroj kiuj ne obeis al la leĝoj—la tabelon oni povas senlimigi.

Roosevelt tre amas infanojn. Lia frazo, "Race Suicide," ("La Memmortigo de la

Raso") estas fama; li kredas je la multeco da infanoj, kaj oni ofte ŝercas kun li pro tio. Ĉiuj infanoj, kompreneble, amas lin.

Lia alia frazo, "the strenuous life," estas tute karakteriza je li, ĉar, se li ne vivas la multageman vivon, kiu ĝin vivas?

Li edziĝis dufoje. Alice Roosevelt, kiu edziniĝis je Nicholas Longworth en 1906, estas la filino de lia unua edzino; la nuna S-ino Roosevelt estas la patrino de l' aliaj ses.

Li admiris la imperiestron Vilhelmon IIan. Kaj inter liaj intimaj amikoj estas ankaŭ S-ro Jusserand, la franca ambasadoro.


Efektive Prezidanto Roosevelt estas ĉio. Kiam oni anoncis al li ke li estas nomita vic-prezidanto, oni lin trovis leganta Tucididon. En la hejto de batalo li ĵuris kaj malbenis kvazaŭ ordinara sovaĝemulo. Kiel diplomatiisto li estas sen egalulo.

Li verkas kun sama facileco pri la ĉaso de leonoj kiel pri la historio de New York. Li estas sportulo. Li —nu, li estas Theodore Roosevelt.

Tie ĉi vidu kiel la ŝercaj-desegnisto j amas lin reprezentanti.

Kia propagandisto li povus esti por kaj pro Esperanto!

DAVID H. DODGE.



Kronologio Roosevelt'a

El "Theodore Roosevelt, the Citizen," de Jacob A. Riis; eldonita, de The Outlook Company, New York.

Naskita en New York City, Okt. 27, 1858.

Eniris Harvard'an Kolegion, 1876.

Eliris Harvard'on kun diplomo, 1880.

Ellernis la leĝosciencon, 1880-1.

Elektita al New York'a Legislaturo, 1881.

Reelektita New York'a Legislaturo, 1882.

Reelektita New York'a Legislaturo, 1883.

Delegito al New York'a Statkunveno, 1884.

Delegito al Nacia Kunveno, 1884.

Ranĉumis Okcidente, 1884-1886.

Kandidatigita por urbesteco de New York, 1886.

Anigita de Usona "Civil Service" Komisio, 1889.

Prezidentigita de New York'a Policestraro, 1895.

Nomita Helpa-Sekretario de l'Militŝiparo, 1895.

Nomita Lieut.-Kol. de Unua Vol. Kavalaro, Majo, 1898.

Antaŭenigita al Kol. de Unua Kavalaro, Julio, 1898.

Elektita Guberniestro de New York'a Ŝtato, Nov., 1898.

Unuvoĉe Kandidatigita por Vic-Prez. de Usono, Junio, 1900.

Elektita Vic-Prez. de Usono, Nov., 1900.

Fariĝis Prezidanto de Usono, Sept., 1901.

Elektita Prezidanto de Usono, Nov., 1904.

Igis Pacon inter Rusujo kaj Japanujo, Aŭg., 1905.

Vortoj de Daniel Webster

"Kiam miaj okuloj la lastan fojon ekturniĝos por rigardi la sunon en ĉielo, mi ne vidu ĝin brilanta sur la senhonorigitajn derompajojn de iatempe glora unuiĝo, sur ŝtatojn disigitajn, malakordajn, malpacemajn, sur landon disŝiritan de internaj malamoj, aŭ trempitan eble en frata sango. Vidu prefere ilia lasta malforta, prokrastiĝanta rigardo la gloregan standardon de l'Republiko, nune konata kaj honorata sur la tuta tero, ankoraŭ altege tenitan, ĝiajn armilojn kaj venksignojn brilantajn en sia antaŭa beleĝeco, kun nek unu strio surstrekita

aŭ makulita, nek unu stelo ombrigita, portantan kiel devizon nenian malestimindan demandon kiel: 'Kion ĉio ĉi valoras?' aŭ tiujn ĉi aliajn vortojn de trompo kaj malsaĝeco; 'Unue la libereco, poste la unueco!'—sed ĉie, disigantan sur ĝia tuta amplekso per literoj de viva lumo, flamegantan sur ĝiaj vastaj faldoj dum ili flirtadas super la maro kaj super la lando, kaj en ĉiu vento sub la tuta ĉielo, tiun alian senton, amatan de ĉiu vera usona koro—la Libereco kaj Unueco, nun kaj ĉiam, unu kaj sendisiĝa."

Esperantigis, H. S. BLAINE.

Lasta Kiso

Al A. L. kaj E. M.

Vi kien flugas, papilio,
Tremante kaj rapide?
Ĝam mortis rozo kaj lilio,
Kaj venas frost' perfide.

Flugiloj viaj kvazaŭ lampo
Briletas en nebulo;
Vi kion serĉas tra la kampo,
Perdita somerulo?

Dezertaj estas la ĝardenoj,
Kaj vana l'amo via.
Skeletoj ŝajnas la vervenoj
Sub laŭbo senfolia.

Vi kial flugas en malvarmo,
Tra flora la tombejo?
Sur ĉiu loko pluva larmo
Nun restas en herbejo.

Silentas ĉiuj en la nestoj,
Kaj svenis bonodoroj;
Plu ne batalos vi kun vespoj
Pri la floretaj koroj.

Jen restas nur en kampo vasta
Velkinta krizantemo,
Sur kiu kiso via lasta
Mortigos vin en tremo.

EDMOND PRIVAT.

Vespera Penso

Fluganta birdo;
Kampo vaste ondanta;
Vesper' ĉion kovranta;
Supre, stelo.

Ĝentila vento
Kiel sopir' tremanta;
Estas la kis' mortanta
De la tago.

Kial estas mi malgaja?
Mia pens'—mi timas ĝin;
Mi, kiel tago, devos morti,
Kaj eble nur foriros plori,
En la nokto sen fin'.

LILY YOUNG COHEN.

El "La Komercisto de Venetio"

(Akto IV., Sceno 1.)

La kompatecon oni ne devigas;
Ĝi falas, kiel dolĉa pluv' el ĉielo
Sur la malsupran lokon; ĝi benita
Dufoje estas. Benas ĝi donanton
Kaj ricevanton ankaŭ; ĝi konvenas
Pliibone ol la krono la monarkon.
La scepro montras la potencon mondan,
La ecojn de la tim' kaj majesteco,
Pro kiuj oni timas pri la reĝoj;
La kompateco, tamen, ĝin superas;
En kor' de ĉiu reĝo entronita,
Ĝi estas eco de la Dio mem;
Kaj similiĝas plej la hom' potenco
Al tiu de la Dio tiam, kiam
La kompateco moderigas kaj
Moligas la justecon.

Esperantigis el Shakespeare,

W. S. HAMBURGER.

"My Country 'Tis of Thee!"*(La Usona Nacia Himno.)*

Ho, mia land, pri vi
Gojege kantas mi,
Libera land'!
Mortis la prapatroj
Tie, la pilgrimoj;
Voku vi montflankoj:
Vivu la land'!

Ho, naskoland' de mi,
La liberecon vi
Portas al ni!
Ĉiu river', kampar',
Ĉiu mont', kaj arbar'
Kara al koro, ĉar
Vin amas mi.

Aŭtoro, patra Di',
De l' liberec', al Ci
Nun dankas ni.
Donu prosperon, Reĝ'!
Regu la justa leg'!
Estu laŭ nia preĝ',
Nia reĝ', Ho Di'!

*Esperantigis A. KRAFT.***Avizo al Eldonistoj Esperantaj**

Bonvolu sendi al THE AMERICAN ESPERANTO JOURNAL, 211 West 126th Street, New York City, U. S. A., du ekzemplerojn de librojn kiujn vi volas nin anonci.

Interesa Letero de Doktoro Zamenhof

La usona ĵurnalisto, antaŭ ne longe skribis al la majstro nia, demandante pri kelkaj punktoj de lia personeco.

La genia elpensinto de Esperanto afable respondis per la jena letero, kies la enhavo elmontras la demandojn de la ĵurnalisto:

“Mi respondos mallonge viajn demandojn, kiom mi povas.

1. Mi havas tri nifanojn. 2. Iliaj nomoj kaj aĝoj: Adamo (nask. 1888), Sofio (1889), Lidio (1903). (La du lastaj estas knabinoj.) 3. Mi naskiĝis la 15an de Decembro, 1859. Mian altecon kaj pezon mi ne scias. (Mi estas malalta kaj nepeza.) 4. Familia nomo de mia edzino: Silbernik. 5. Mia bopatro min helpis. 6. Mi kuracas nur malsanojn de okuloj. 7. Mi opinias ke mi neniam vizitos Usonon, ĉar mi sentas min ne kapabla por granda mara vojaĝo; ke Esperanta Knogreso tie iam estos, mi kredas certe. 8. Usono tre plaĉas al mi, ĉar ĝi apartenas ne al tiu aŭ alia gento, sed al ĉiuj homoj, kiuj loĝas kaj honeste laboras en ĝi. Mi kredas profunde, ke Usono estas la tipo de ĉiuj estontaj regnoj kaj landoj. 9. La pli granda parto de miaj parencoj ne scias Esperanton. 10. Mi tre amas poezion kaj muzikon; sed bedaŭrinde la tro okupata tempo tute ne permesas al mi ĝui ilin. Mian fotografaĵon mi nun ne havas. Via,

ZAMENHOF.

La doktoro pardonos nin tial ke ni kopias lian leteron, ĉar, kiel li mem konfesas, lia skribmaniero ne estas tute kiel presaĵo, kaj la plimalgrandigo de la skribaĵo ne helpas al la lego de ĝi!

La kvina rimarko estas respondo al demando ĉu la bopatro de l' doktoro helpis lin eldoni lian unuan broŝuron pri Esperanto.

La precipa valoro de tiu-ĉi letero de la majstro estas ke la doktoro neniel konis sian korespondanton, kaj respondis ĝentile al demandoj kiuj eble ŝajnis al li (nekonanta nian



Fotofarita de Piron, Paris

Kara Lektoro!
La respondos mallonge
viajn demandojn, kiom mi povas
 1. Mi havas tri nifanojn.
 2. Adamo (nask. 1888), Sofio (1889),
 Lidio (1903) (la du lastaj estas
 knabinoj.)
 3. Mi naskiĝis 15/12 1859. Mian
 altecon kaj pezon mi ne scias
 (mi estas malalta kaj nepeza.)
 4. Familia nomo de mia edzino:
 Silbernik.
 5. Mia bopatro min helpis.
 6. Mi kuracas nur malsanojn
 de okuloj.
 7. Mi opinias ke mi neniam
 vizitos Usonon, ĉar mi sentas
 min ne kapabla por granda
 mara vojaĝo; ke Esperanta

*Knogreso tie iam estos, mi
 kredas certe*
 8. Usono tre plaĉas al mi, ĉar
 ĝi apartenas ne al tiu aŭ alia
 gento, sed al ĉiuj homoj, kiuj
 loĝas kaj honeste laboras en ĝi.
 Mi kredas profunde, ke Usono
 estas la tipo de ĉiuj estontaj
 regnoj kaj landoj.
 9. La pli granda parto de
 miaj parencoj ne
 scias Esperanton.
 10. Mi tre amas poezion kaj
 muzikon; sed bedaŭrinde la tro
 okupata tempo tute ne permesas
 al mi ĝui ilin.
 Mian fotografaĵon mi
 nun ne havas.

Zamenhof

tag-ĵurnaliston usonan) strangajn kaj iom tro pripersonecajn, sensanĉele.

Kiam Usono havos kongreson esperantistan, la doktoro spertos niajn ĵurnalistojn!

Rimarku ke la majstro aprobas la vorton. “Usono,” pri kio oni sin turnu al la deka paĝo de tiu ĉi numero de THE AMERICAN ESPERANTO JOURNAL.

The American Esperanto Journal

JANUARO, 1908

No, 13

Redaktoro, - - - DAVID H. DODGE

LA nova jaro devus alpreni novajn esperojn kaj novajn resolvojn. Por esperantistoj la alveno de 1908 certe alprenas grandan fidon je la triumfo de nia lingvo. Post malmultaj monatoj Esperanto estos ĝuste dudekunujara kaj estos atinginta la aĝon kion oni kutime konsideras signifa je plenkresko. En vero, Esperanto havas nun la fortecon de plenkreskulo, kaj en tiu fakto devas naskiĝi niaj esperoj por la nova jaro. Ni sendube trovos ke Esperanto dum 1908 elmontras la fortecon de forta viro kaj venkos kontraŭ ĉiuj baroj. Pri niaj resolvoj 1908'aj, tiuj estas facilaj. Ni rezolu ke ni staru kuraĝe kontraŭ ĉiuj sinintermetantoj kiuj, ĉu tial ke ili ne tute komprenas la ideon de l'vorto "internacia," au tial ke ili estas avaraj al memreklamo, proponos ŝanĝojn difektontajn la Fundamenton. Tiel armitaj, ni povos certigi ne nur feliĉan novan jaron sed kontentigan tutjaron.

* * *

Estas frazo kiun ĉiu esperantisto povas uzi parolante, ĉiamomente. Ĝi estas: "Neniam estis Esperanto pli sukcesa ol hodiaŭ." La frazo estas ĉiam vera, ĉar la sukceso de Esperanto kreskas ĉiam aritmetikaprogrese, kaj eble venos la tago kiam la progreso estos geometrika! Ke tiu ĉi nuna sukceso estas fakto pruviĝas per la provoj, eksteraj por ĝin anstataŭigi per ia fuŝlingvo, interaj por ĝin plibonigaĉi kiujn malmultaj personoj nun faras. Neniu atakas senvivan korpon. Ni do ne ĉagreniĝu kiam malmulte da mempriskribitaj-aŭtoritatuloj aŭ supozataj esperantistoj kritikis Esperanton. Prefere, ni ĝoju tial ke ili elspezas siajn energiojn kontraŭ ni. Ni estas nun en pozicio kie ni povas ridi je ili, ĉar ni scias ke iliaj penoj certe malsukcesos kaj ke la penoj mem estas al ni vera komplimento.

La supersignitaj literoj esperantaj incitas multe da tiuj ĉi plibonigemuloj. Unu ne ŝatas aldoni ilin skribante, kaj alia trovas malfacilaĵojn ĉe presisto. Nu, la diferenco de laboro skribi "c" kaj "ĉ" ne estas grandega, kaj, niaflanke, estas nia opinio ke la supersignoj belegas la vidiĝon de skribaĵo kaj presaĵo. Ni forte kontraŭstaros ke ili foriĝu. Pri presistoj, oni memoru ke Romo ne estis konstruata dum unu tago. Jam estas multaj diversaj stiloj de preslitteroj esperantaj, precipe en Eŭropo, kaj eĉ tie ĉi la fabrikistoj sin vidigas pretaj fabriki plu. La provizo ĉiam aranĝiĝas per la postulo. Sed tuj kiam tiaj negravaĵoj sin aperigas al la plibonigemuloj, leviĝas blekego ĉielon kaj urĝa petego ke D-ro Zamenhof forigu la supersignojn. Kompatinda homo! Imagu kiel senkompatate tiuj ĉi novaĵemuloj tirus je lia vesto se ili povus lin atingi. Li evidentigas sian saĝecon restante en sia hejmo malproksima.

* * *

Kiel usonanoj, ni kredas, kompreneble, je la libereco kaj la unueco. Sed nia libereco esperanta estas tuta permeso fari novajn vortojn—kun la rizervo ke aliaj havos egalan liberecon ne ilin uzi se ili ne plaĉas al tiuj; nia unueco povas nur esti konservata se ni ne ŝanĝos la Fundamenton. Legu la tradukon, de S-ro Blaine, la sekretario de la Toledo, O., Esperanta Klubo, sur paĝo 5, de la vortoj de Daniel Webster, parolitaj tridek jarojn antaŭ la interŝtata milito de 1861-1865, kaj memoru ke la principo estas la sama.

Gibes

John Kendrick Bangs is not a scintillating humorist, but once in a while he gets rid of a rather good thing. In his department in *Everybody's Magazine* a little while ago, he is asked if he has studied Esperanto. "No," he replies, "I don't care for canned tongue."

The next exposition in the United States of any consequence will be in honor of Hendrik Hudson, to be held in 1910. The Usonian Esperantists hope to be represented at this exposition with good space. "What'll you sell," asked a mocker of the universal language, "wheat cakes?"

Nia Nova Ŝtato: Oklahoma

LA 16an de Novembro, 1907, per moveto de plumo tenata de prezidanto Roosevelt en Washington, ekekzistis la kvardekseca Ŝtato de Usono. Pri tiu ĉi usonero, kies lokon oni povas vidi per rigardo al la karto, ni parolu mallonge.

Oklahoma ricevas sian nomon el la lingvo comanche'a (indiana). Ĝi signifas: "La lando de la bela dio," kaj la nomo estas bone meritita. La supraĵo estas 70,430 kvadrataj mejloj (18,240,600 hektaroj) pli granda ol la ŝtatoj Massachusetts, New Hampshire, New Jersey, Rhode Island kaj Vermont, kunaldonitaj. La enloĝantoj estas 1,408,732. Ĝi provizas ĉiujare 97,000,000 buŝelojn da greno, 30,000,000 buŝelojn da tritiko, kaj 670,000 pakegojn da kotono. Almenaŭ kvinono da la tuta provizo de petrolo amerika venas el Oklahoma, kaj grandegaj amasoj da mineraloj, valoraj je \$200,000,000 (400,000,000 spesmiloj) po jaro, estas pretaj al la pikfosilo de la ministo. Estas ankaŭ multe da salo, gipso kaj cemento.

Ĉiu usonero, simile al Usono, havas skribitan konstitucion propran, kaj tiu de Oklahoma estas tre radikala. Ĝi enhavas severajn punojn kontraŭ la "trustoj," kaj la fervoj-estaroj kiu provos eviti la leĝon, kaj—la virinoj atingis tiun ĉi punkton—ĝi estas entute kontraŭalkohola! Unuj diras ke la konstitucio Oklahoma'a estas supera je la konstitucio usona; sed aliaj plendas ke ĝi enhavas tro multe, kaj ke libereco individuala estas mal-

pligrandigita. Sed la Oklahoma'anoj ĝin ŝatas, kaj kiu alia rajtas kontraŭstari?

La guberniestro estas Charles N. Haskell, kaj unu el la du anoj de l' senato usona estas Thomas P. Gore, blindulo. Oklahoma estas forte demokratema—afero kiu ne plaĉas al la republikana administracio federala. Dum longa tempo, S-ro Roosevelt ŝanceliĝis sub-



skribi la ordonon kiu farus la teritorion ŝtato.

Ĉe Guthrie, la ĉefurbo, paroladis S-ro Haskell, dum la festeno: "Ni ne estas tie ĉi por adori la oficiston kiu donis al ni niajn rajtojn. Danki per frazoj trosuĉmetiĝaj al la oficistoj kiuj fine plenumis devon longe kaj maljuste prokrastitan estas kvazaŭ ĉirkaŭpreni la piedojn de ŝuldinto kiu pagas sian justan ŝuldon." Estas sufiĉege da sendependemo en Oklahoma!

Nun restas en nia lando nur du teritorioj, Arizona kaj New Mexico, kaj kredinde en malmultaj jaroj ili ankaŭ ŝtatiĝos.

Al la Plibonigemuloj

Lasu la lingvon, kia ĝi estas!
Ne "plibonigu" ĝin peno kritika!
Kvankam terminoj dubaj eĉ restas!
En si mem estas ĝi do fortika.

Sed konstruaĵon daŭre skuante
Fine alvenos per vi la momento,
Kiam pro viaj batoj tremante
Ĝi ŝanceliĝos ĝis fundamento!

Pensu, ke lingvo estas vivanta
Inter la homoj; pro tio ĝi devas
Esti uzata de ili, kreskanta
Laŭ la bezono—ne kiel vi revas!

Lasu la lingvon—taŭga ĝi estos,
Kiel ĝi taŭgas jam por iu celo:
Certe, nur tial forta ĝi restos,
Ĉar forta gardos ĝin nia fideleto!

L. E. MEIER.

(El Lingvo Internacia.)

Pri la Vorto "Usono"

NI AJ legantoj rimarkos ke ni uzas iom ofte en tiu ĉi numero de THE AMERICAN ESPERANTO JOURNAL la vorton **Usono** kaj ĝiajn elaĵojn. Ĝi nun, la vorton oni ne uzis universale en la ĵurnaloj esperantistaj, krom en *Lingvo Internacia*, kiu, ni kredas, unua faris ĝin la kutima vorto por esprimi pli kunvene la Unuigitajn Ŝtatojn de Ameriko. **Usono** devenas, kiel la plejmulto da niaj legantoj sendube scias, el la unuaj literoj de la frazo "United States of North America"; la vorto ricevata finiĝas je *a*, kaj kompreneble fariĝas adjektivo; la nomo nature finiĝas je *o*. Per tiu nomo oni ĝis nun trakukis la landon.

Ni dankas al *Lingvo Internacia* pro ĝia iniciato en tiu ĉi afero, kaj do ni presigas des pli ĝoje la jenan leteron de S-ro Pierre Corret, skribitan al la antaŭa redakcio de THE AMERICAN ESPERANTO JOURNAL:

"Kun multe da intereso mi legis vian leteron pri la vorto 'Usono.'

"Mi volonte konfesas, ke tia artefarita vorto ne estas kiel kontentiga, kiel la oficiala 'Unuigitaj Ŝtatoj'; sed de nia flanko ĝi ne estis pura fantaziaĵo; ĝin ni ricevis el Ameriko, kaj ni ĝin uzis pro la malfacileco formi *adjektivon* per la oficiala nomo.

"Vi sendube rimarkis, ke ni raportas pri la Esperanta Movado franca, germana, sveda, ktp. Por la movado en la Unuigitaj Ŝtatoj ĉu ni diros: Movado *Unuigitaj-Ŝtatoj-a?* Mi ne kredas ke vi tion konsilus!

"'Nord-Amerika' ankaŭ ne taŭgas; kaj 'Amerikana,' proponita de S-ro Hunter, ne

ŝajnas tre bone formita en la pure esperantista vidpunkto.

"'Amerika'=de Ameriko. 'Amerikana'=de *Amerikano* aŭ de *Amerikanoj*. Ekz.: 'Amerikaj arbaroj'=arbaroj de Ameriko; 'amerikanaj kutimoj'=kutimoj de *Amerikanoj*; t. e. de la anoj (membroj, loĝantoj de Ameriko).

"Kompreneble ni ne celas trudi al vi fantazian nomon. Ni provizore akceptis 'Usono,' ĉar ni ne povas adjektivigi 'Unuigitaj Ŝtatoj,' kaj ĉar 'Nord-Amerika' ne taŭgas kaj 'Amerikana' ne estas bone formita por signifi 'de la Unuigitaj Ŝtatoj'; sed ni estas aparte dankaj al niaj samideanoj de U. S., se ili trovus taŭgan nomon, kiun ni tuj ĝoje akceptas.

Tre kore,

PIERRE CORRET,

sekr. de la Red. de *L. I.*

Ni mem ŝatas kaj aprobas **Usono**. Sed estas aliaj kiu proponis *Usonujo* por traduki la landon, kaj *Usono* por traduki la enlandanon. Tiuj ĉi havas iom da logiko en sia argumento, ĉar la landoj preskaŭ ĉiuj finiĝas per *ujo*, sed la kunveneco de la pli mallonga vorto, ni pensas, estas evidenta, kaj la formo elvokas al la sentimentaleco de la usonano.

Oni rimarku sur paĝo 7 ke D-ro Zamenhof mem uzas **Usono** por esprimi la landon.

Tamen, ni ŝatas aŭdi el niaj legantoj pri tiu ĉi afero. Samtempe, ili diskutu pri la vorto *Kanado* aŭ *Kanadujo* en la simila rilato.

